



JOHANO, ĈU ANKAŬ VI ESTAS SENDORMA?
A HA...
KVIVIT KVIVIT
MORGAŬ NI REIRU EN LA ARBARON POR ELTROVI LA FONTON DE TIU SONO.
JES!
FRAŬLO JOHANO?!
FRAŬLO RAVELIN?!
ONI VERE NE POVAS MALATENTI ILIN DUM UNU SOLA MINUTO!
MI NENION VIDAS, SED... LA SONO VENIS DE ĈI TIE!
NI IRU EN LA PROFUNDAĴON DE LA ARBARO!


AAAAJ!
LA DOMO DE BIREO, LA ARBARISTO, ESTAS LA DOMO PLEJ PROKSIMA AL ĈI TIU AREO DE LA ARBARO!
VI SURPAŜIS KAPTILON, KAJ VIA PIEDO ENKAPTIĜIS!
ATENDU! MI SERĈOS HELPON TUJ!
KIO OKAZIS, RAVELIN?
AĤ... MIA PIEDO!
MI NENIAM IMAGIS, KE LA JUNULOJ IRUS EN LA PROFUNDAN PARTON DE LA ARBARO!
BIREO, KIAL DIABLE VI LOKIS KAPTILON TIE?
LA VUNDOJ FERMIĜOS POST KVIN TAGOJ.
VE, MI ESPERAS, KE LI RESANIĜOS RAPIDE!
LA KORPO DE FRAŬLO RAVELIN ESTAS MALFORTA...
TAMEN, LI HAVAS FEBRON... LI RESTU ĈI TIE DUM LA NOKTO, POR RIPOZI.



KIU ESTAS TIE...?
MIA KORPO BRULAS...
RIDETU PLI GAJE, ĈIRKAŬVOLVU MIN PER VIAJ VARMAJ BRAKOJ.
PANJO! TIU MALVARMA RIDETO...
PAĈJO? ĈU VI NE ESTAS MIA PATRO?
KIU VI ESTAS, DO? RESTU ĈE MI!
RESTU ĈE MI, PAROLU KUN MI... PAĈJO.
PAĈJO!
KIO MISAS? ĈU VI ESTAS LACA?
RAVELIN, FRATETO!


DO... ESTIS VIA MANO, FRATO.
MI PENSIS, KE ESTIS LA MANO DE PAĈJO. JU PLI DA TEMPO PASAS, DES PLI VI SIMILAS AL LI...
FRATO JOHANO...
VI ESTAS EN LA DOMO DE STEFANINO, ĈU VI NE MEMORAS?
PAĈJO...
ĈU VI SCIAS, KIAL RAVELIN NE ESTAS ĈE NI HODIAŬ?
ĈU VI JAM VIZITIS LIN, PAĈJO?
JES, MI SCIAS. LAŬRA DIRIS AL MI.


LI HAVIS FEBRON, KAJ LI VOKIS VIN DUM SONĜOJ.
PA-ĈJO...
VIA KORO NE ESTAS ĈI TIE, KUN NI... SED EN ALIA LOKO.
PAĈJO, RAVELIN SOPIRAS VIN. KAJ ANKAŬ MI...
FOJFOJE MI SCIVOLAS, ĈU VI VERE AMAS NIN, PAĈJO.
SINJORO, IU ATENDAS VIN ĈE LA TELEFONO...
NE DIRU STULTAĴOJN. VI DU ESTAS MIAJ FILOJ AMATAJ.
JOHANO...
POST LA VESPERMANĜO, MI VIZITOS LIN, ĈU BONE?



ĈU VERE NUN?! ĈU VI NE VIZITOS VIAN FILON?
MI REVENOS POST DU AŬ TRI TAGOJ.
ESTIS EMILO, MIA NEGOCKAMARADO. MI DEVAS IRI EN HELSINKON SUFIĈE RAPIDE!
PAĈJO, KIO OKAZAS?
JES, KOMPRENITE.
NE, MI TUJ IRU. DANKON.
VRUM
VŜŜ
ŜAJNAS, KE LA VENTO PLIFORTIĜOS ĈI-NOKTE...
KRAK


STE-
FANI-
NO!
HA!
JOHA-
NO!
KION...
KION VI
FARAS?
KAJ...
JOHANO,
NE MAL-
TRANKVI-
LIĜU...
MI KISIS
NUR LIAN
FRUNTON!
...
BONE, NE
RIGARDU
AL MI TIEL!
MI FORIROS,
MI FORIROS
TUJ!
HE, ĈIT! NE
KRIU, AŬ VI
VEKOS VIAN
DORMANTAN
FRATON!


BUM
バタン
SED... KIO ESTAS ŜIA CELO?
ŜI DAŬRE FARIĜAS PLI KAJ PLI STRANGA!
ĈI TIO ĴUS KOMENCIĜIS...
MI INTERMETOS MIN INTER ILI IOM POST IOM...
HA HA HA HA!
HA HA!
はあ
AĤ
はあ
AĤ
KIO MISAS, RAVELIN?
HE! RAVELIN!!
AĤ, FRATO!
VI VEKIĜIS! KIAL VI ĜEMIS DUM VI DORMIS?
MI HAVIS SONĜON.
ĈIRKAŬ MI KRESKIS DENSEGA NIGRA NEBULO. NE TEMIS PRI AGRABLA SONĜO, CERTE NE.


KRAK
ガタ ガタ
LA VENTO! ĈI TIU DOMO ESTAS KADUKA, KAJ LA FENESTROJ ESTIGAS BRUOJN.
PAĈJO MALTRANKVILIĜIS PRI VI.
LI VOLIS VIZITI VIN, SED LI DEVIS IRI AL HELSINKO PRO URĜAĴOJ RILATAJ AL SIA LABORO.
SE MIA FRATO ESTAS ĈE MI...
MI VERE NE BEZONAS ION ALIAN.
SED MI ANKORAŬ TIMAS. ĈU VI BONVOLUS DORMI KUN MI ĈI-NOKTE?
HO, BONE. LA LITO ASPEKTAS SUFIĈE GRANDA.



VIA PATRO SUFERIS AŬTAN AKCIDEN-TON!
KIAL VI VEKAS NIN MEZE DE LA NOKTO, LAŬRA?
ONI ĴUS TELE-FONIS AL MI...
BUM
FRAŬLOJ, TERURA AFERO OKAZIS!
LA STIRRADO MISFUNKCIIS, KAJ LA VETURILO FALIS DE SUR KRUTAĴO!


PAĈJO MORTIS TUJE.
KAJ LA FUNEBRAĴOJ ESTIS PLENAJ DE SILENTO.
ĈIO PRO-GRESIS SUFIĈE TRANK-VILE.
FRAP FRAP
ĈU VI PETIS VIDI NIN?



MI DIRIS AL LI, KE LI POVIS VENI AL HELSINKO MATENE, POR KE LI NE STIRU DUM LA NOKTO, SED LI NE VOLIS SEKVI MIAN KONSILON...
ANTAŬ OL LA AKCIDENTO, MI PAROLIS KUN LI PER TELEFONO.
MI ESTAS EMILO, LA KOLEGO DE VIA PATRO.
JOHANO KAJ RAVELIN, ĈU NE?
ESTAS PLEZURO, SINJORO!
NE FARU AL VI ZORGOJN PRI VIA VIVSTILO. JAM DELONGE MI PRIZORGAS LA FINANCOJN DE VIA BIENO.
NU... ONI PAROLU IOMETE PRI VI.
KION ONI FARU? NU, ONI POVAS PROFITI LA NUNAN... «ŜANCON»... POR KE VI KOMENCU IRI AL LERNEJO. MI POVAS SERĈI BONAN LICEON POR VI.
KIEL VI SCIAS, VIA PATRO NE ŜATIS SENDI VIN LERNEJEN.
SED NI DUNGIS DOMAN INSTRUISTON. DO NE MALTRANKVILIĜU.
MIA FRATO ESTAS TRE MALFORTA!
NE EBLAS SENDI LIN EN LERNEJON!


MI MIRAS PRI ĈIO ĈI...
PAĈJO MORTIS, TAMEN NENIO ŜANĜIĜIS.
LA ARBARO, LA LAGO...
NIAJ VIVOJ...
KAJ NIAJ KO-ROJ...
A HA...
MALGRAŬ TIO, KE NI KLOPODIS PROKSIMIĜI AL LI, NI NENIAM POVIS ENIRI EN LIAN KORON...
HE, RAVE-LIN!
STEFA-NINO!
FINFINE MI TROVIS VIN NE-AKOMPA-NATAN!
VIA FRATO JOHANO NENIAM LASAS VIN SOLA, KAJ MI VOLAS PAROLI KUN VI...
NI DU, PRIVATE.
MI BEDAŬRAS TION, KIO OKAZIS AL VIA PATRO. SED NE MAL-TRANKVILIĜU.



FRATETO, KI-ON VI FARAS? ĈU NI NE KONSENTIS, KE NI IRUS AL LA ARBARO?
DANKON, STEFANINO...
MI NE SCIIS, KE ŜI ESTIS TIOM AFABLA.
ŜI DIRIS AL MI IUJN KURAĜIGAJN VORTOJN.
NE DIRU TION PRI ŜI, FRATO!
NU, ĈU TIU VIRINETO DENOVE KAPTAĈIS VIN?
HE HE HE
KAJ NUN VI VOLAS, KE MI LABORU POR MAKULI ĜIN, ĈU?
MI METIS MIAN PLEJ BONAN ROBON SUR MIN!
KIAL VI SURHAVAS TIUN ROBON? ĈU VI IRAS AL KERMESO?
EKBALAU, MI PETAS!
STEFANINO!


KVIVIT
DENOVE TIU SONO, JOHANO.
TIU SONO NEPRE VENAS DE LA BLANKFLAMA LAGO...
EKDE ANTAŬ KVAR AŬ KVIN TAGOJ, ĜI ESTAS MULTE PLI LAŬTA...
KAJ LA KANTADO ŜAJNAS AL MI IOM PLI... MALĜOJA.
KVIVIT
JOHANO, MI NE SCIAS KIAL, SED... MI EKTIMIS IOMETE. ĈU NI IRU HEJMEN?
ĈIT!
LA TURO!
LA SONO ELIĜAS EL LA TURO!



LA PUTO!
LA SONO VENAS EL LA PUTO!
CERTE LA SONO VENAS DE LA KRONOJ DE TIUJ ARBOJ!
KIAN IMAGPOVON VI HAVAS!
LA SONO VENAS DE LA ALIA FLANKO, MI CERTAS...
NE...
JEN MALLARĜA VOJO!
ĜI KONDUKAS AL LA TURO!
ATENTON, LA ESKALO ESTAS IOM GLITIGA!
RAVELIN, EBLAS MALSUPRENIRI! JEN ŜNURESKALO ANSTATAŬ SITELO!
PRAVE, ĜI VENAS DE ĈI TIU PUTO!
ESTOS DANĜERE, FRATO!
NI MALSUPRENIRU!
NE... ANKAŬ MI VOLAS IRI MALSUPREN!
SE VI NE VOLAS, VI RAJTAS RESTI ĈI TIE.




FRA-
TO...
ATENTU! LA SONO FARIĜAS PLI FORTA! NI PROKSIMIĜAS!
JEN POR-DO!
KVIVIT
KVER
ĜI ESTAS ŜLO-SITA!
NI PUŜU LA PORDON POR EN-ROMPI! ĜI ESTAS TRE MALNOVA.
BAC
!
ARBARO!


BRRŜ
MI NE SCIIS, KE ESTIS BELEGA ARBARO SUB LA TURO...
ĈIT!!
JUNA INO!
KIAL ŜI ESTAS ĈI TIE?
S-SALUTON. KIEL VI NOMIĜAS? MI ESTAS RAVELIN.
AAAA!


FAL
KION VI KAŜAS? MONTRU AL NI!
AAAA!
ŜAJNE ŜI NE SCIPOVAS PAROLI!
KIO?!
DE PAĈJO, ĈU VE-RE?
RIGARDU LA UNUAN PAĜON!
ĈI TIO ESTAS TAG-LIBRO.
RAVE-LIN, JEN LA MAN-SKRIBO DE PAĈJO!
Mi faros mian plejeblon por ke Mikaelino kresku kun animo por ĉiam pura.
Gustavo J. LANTOO


KVIVIT
KVIVIT
ĈU ŜIA NOMO ESTAS «MIKAE-LINO»?
ŜIA KAN-TADO!
JOHANO, ŜI ESTAS LA NAJTINGALO, KIUN NI SER-ĈADIS!
NUN MI EK-KOM-PRE-NAS!
MI EK-KOMPRENAS KIAL LI MAL-DUNGIS TIUN DOMAN INS-TRUISTON, KAJ NUN NI SCIAS KIAL LI NENIAM ATENTIS NIN.
KIO MISAS? VI SUBITE PALIĜIS.
RAVELIN, LEGU TION!
NIA PATRO OKUPIĜIS PRI LA EDUKADO DE TIU INO... PROBABLE ŜI LOĜAS ĈI TIE EKDE KIAM ŜI ESTIS BEBO.



ŜI SCIIS NUR UNU VORTON, KAJ TIU VORTO ESTIS ŜIA NOMO...
ŜI NENIUN ALIA KONIS.
ŜIA IZOLITA MONDO MAL-PERMESIS LA DISVOLVIĜON DE LINGVO.
MIKAELINO.